

# HEKIS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO


REDAKTORO:  
S-RO MIGUEL A. ALTUNA

N.º 95  
Jul.-Aüg. 1975

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.<sup>a</sup>  
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



INRERESIGULOJ



# \* ENHAVO \*

Plia gratulo.....	1
HEJO-Seminario en Coimbra.....	2
Pri l'ĉiam maljuste juĝata "ci".	3
La malmoderna homo de la 2313j.	4-5
Cu vi vizitis la H.E.M.?	6-7
Informoj.....	7
Pri nia regularo.....	8-9-10-11
Doktor Esperanto.....	11-12
La urba rabisto.....	13-14
Keĉua, oficiala lingvo.....	14-15
Muzika paĝo.....	16

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de HEJS, escepte en okazo de oficiala komunikado; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## PLIA GRATULO

Saluton, geamikoj, el tiu ĉi antaŭkongresa bulteno, kiam niaj valizoj sopire atendas vojaĝon.

Jes, prave; post la aprila gratulo al nia revuo fare de la Redaktoro de "Esperanto" nova favora komento trafis nin. La konata proverbo, keleniu profetas en sia lando, ne validis ĉi-okaze. En la n<sup>o</sup> 72 de "Boletín", organo de HEF, en sia apartaĵo "Revuo de la revuoj" S-ro Fernando de Diego alte taksas nian "HEJS", kaj postulas por ni la subtenon kaj stimulon de HEF, kaj pli seriozan kunlaboron inter maturaj kaj junaj esperantistoj, "senrigarde al eventualaj politikaj diferencoj".

Tiun ĉi lastan aldonon pri politikaj diferencoj ni tute ne povas kompreni, pro tio ke en nia agado kaj oficiala sinteno ni estas strikte senpartiaj, kiel klare montras nia Regularo en punkto 6.

Kiel ajn, ni sincere dankas la mencion de S-ro de Diego, kaj el tiu ĉi paĝo rendevuas lin al kunlaboro en nia bulteno, kiun li volonte proponis al ni. Estu certaj ke ni havos la plezuron ĝui lian lertan stilon minimume en nia eksterordinara 100<sup>a</sup> numero.

Coimbra : 75.09.14 - 09.20

TEJO-SEMINARIO 

De kelkaj jaroj junaj esperantistoj komencis pli fundajn esplorojn pri la rolo de lingvo kaj kulturo en potencrilatoj.

La trudado de la lingvoj de grandaj nacioj al malgrandaj, de metropoloj al kolonioj, de elitoj al popolaj masoj, estas vasta fenomeno, kiu profunde influas la potencrilatojn kaj siavice estas influata de ili.

TEJO organizas studkonferencojn, diskutrondojn, seminariojn, manifestaciojn; eldonas broŝurojn, raportojn, flugfoliojn; kolektas artikolojn, studojn pri la temo.

Kiel sekvo al tiuj seminarioj, ĉi jare TEJO okazigos seminarion sub la aŭspicio de la Fakultato de Beletroj de la Universitato en COIMBRA (Portugallio), kaj en kunlaboro kun portugalaj gestudentoj. Ĝia temo estos "La rolo de lingvo kaj kulturo en politika subpremado".

La lingva kaj kultura subpremado estas nur du el la aspektoj de koloniisma realeco. En liberigitaj landoj ekskoloniistoj ĉiam provadas konservi sian favoran pozicion per sia lingvo kaj kulturo kiuj prefere restu en nov-koloniigita lando. Liberigitaj popoloj ekkonscias pri tiu ĉi fenomeno kaj ili ankaŭ luktas por sia lingva kaj kultura identeco.

Prof. Per DENEZ (bretono), prelegos en la seminario.

Kelkaj praktikaj detaloj:

Kotizo: 100 FF. Lingvoj: portugala, angla, franca kaj ESPERANTO, kun samtempa tradukado. Vojaĝkostoj: repago de vojaĝkostoj dependos de la fina financa situacio de la seminario. Informoj kaj aligoj estas riceveblaj ĉe: TEJO-Komisiono por Eksteraj Rilatoj, Kastelenstraat 231, AMSTERDAM 1011 (Nederlando). Postgirkonto: 1497537, nome de Stichting Taalproblemen, AMSTERDAM.

## pri l'ĉiam maljuste juĝata "ci"

Kiom da personoj luktas kaj luktadas kontraŭ la sendefenda pronomo "ci"!!! Eĉ KALOCSAY en sia libro "Lingvo Stilo Formo" preskaŭ postulas ĝian malaperon. Li aludas ke ZAMENHOF mem konsilis uzi ĉiam "vi"-n anstataŭ "ci"-n; kaj certe ZAMENHOF tion konsilis, sed li ankaŭ aldonis, ke oni povas uzi "ci"-n se oni tre sentas la bezonon. T. e., ni uzu "vi"-n, sed kiam ni bezonas "ci"-n, ni rajtas ankaŭ ĝin uzi.

Kompreneble se oni diras "mi amas vin", oni ne malpli amas ol se ni dirus "mi amas cin", nek male. Tamen, travidante kelkajn librojn (precipe tradukitajn), oni trovas frazojn kiajn: "Tú, mi Maestro", kiujn oni ja povas traduki ĉu "Vi, mia Majstro", ĉu "Ci, mia Majstro", ĉar ambaŭ frazoj estas tute samaj. Nu, ni konstatu ke se ni el iu verko tradukas ĉiujn tiajn frazojn per "ci", tiam la traduko havos en si mem ian sencon, kiu estas esenco de la verko eĉ en la originala lingvo mem, t. e. tiam la senco kaj esenco tute ne ŝanĝiĝos pro la traduko en nian lingvon. Sed, se male ni tradukas tiajn frazojn per "vi", tiam la esenco eĉ ankaŭ la senco de la traduko estos tute aliaj ol tiuj de la originala lingvo.

"Ci", kompreneble, ne nur taŭgas por traduki, sed ankaŭ por verki rekte en Esperanto. T. e. por doni al la originalaj verkoj (same kiel alla tradukitaj) ian tre specialan nuancon. Kredeble en la KALOCSAY'a lingvo ne ekzistas tiu nuanco, kaj pro tio, ne konstatante ĝian gravecon, li volis malriĉigi nian lingvon je tiu gravega nuancplena pronomo. Oni ĉiam devas klopodi ke la gepatra lingvo neniam enmiksiĝu aŭ influu nian komunan lingvon, kiel ŝajne okazis al KALOCSAY eĉ estante tiel grava lingvisto (kaj pro tio pli da honto antaŭ tiu nepardonebla eraro).

Moralajlo: Uzu "vi"-n kaj ne forgesu pri "ci"!!!

NARCÍS FLUVIÁ

# LA MALMODERNA HOMO DE LA JARO 2313

Estas la jaro 2313. Ni estas feliĉaj. La vivo donas al ni multajn avantaĝojn, kio estas frukto de la konstanta progreso de la tekniko kaj scienco.

Ni havas veran modernan vivon. La familia vivo tre ŝanĝiĝis. La domkonstruo estas alistila. La stratoj estas tute meĥanigitaj. Granda rubando transportas la homojn kaj varojn, pro tio eĉ ne estas necesa la piedirado, do apenaŭ fizikan klopodon ni devas fari. La feliĉo plej granda regas nian socion. La homo troviĝas en la pinto de la progreso. Sed en mia urbo, en la urbo en kiu mi loĝas, nigra makulo malbeliĝas nian ĉiutagan vivon. Estas hontinde ĝin rakonti, sed, kion fari? jen la kaŭzo:

En tiu ĉi urbo loĝas homo, kiu vivas kiel vivis la homoj en la jaro 1975. Efektive, tiu malmoderna homo havas strangajn gustojn kaj kutimojn, por ekzemplo li emas piediri, promeni, kia absurdaĵo! Kiam en ĉiu strato troviĝas transportaj rubandoj pro lia kulpo, en kelkaj stratoj ankoraŭ ekzistas tiuj promenejoj, kiuj en la jaro 1975 nomiĝis trotuaroj. Por nia urbo, tiu ĉi homo estas honto kaj la konsilantaro urba decidis ne plu toleri tiun malmodernan vivo formon. Konsekvence, la urbestro sendis al li la jenan leteron, en laŭnuklea skriboformo, el kiu mi ekstraktas la jenon:

S-ro. Pérez.

Vi estas la lasta de familio (eĉ via familia nomo evidentigas el kia raso vi devenas), kiu malgraŭ nia nediskutebla progreso persistas vivi kiel, laŭdire, vivis la homo en la jaro 1975.

.....vi fariĝis por nia socio strangaĵo, kaj honto por nia urbo. Vi havas arkaikajn kutimojn, kiujn ni ne plu toleros.

.....vi kuraĝas manĝi laŭ tiu malmoderna kuirarto, kaj eĉ kontraŭleĝe vi iras al niaj ĝardenoj por planti kaj kreskigi vegetaĵojn, kiam vi mem scias ke simpla pilolo nia nutras vin por la tuta tago.

.....viaj promenaĵoj estas insulto al nia tek  
nika progreso, kiu disponigas al vi ĉion necesan  
por plej facila translokiĝo kaj krome vi gapigas  
niajn samurbanojn kreante konfliktojn surstrat-  
ajn.

.....tamen, tio kio estas tute netolerebla es-  
tas ke vi neniam kaj neniel uzas gasmaskon, mal-  
graŭ tio, ke viaj antaŭuloj mortis pro tiu kaŭzo.  
S-ro Pérez, vi vidas nin feliĉaj kun niaj gas-  
maskoj, kiuj evitas al ni spiri tiun aeron, kiu  
kiel dirite mortigis ĉiujn viajn antaŭulojn. La  
vivo por ni estas bela, vivinda. Paco regas ni-  
an socion. Distribuo de la rento estas egala  
por ĉiu homo kaj la maŝinoj anstataŭas nin en  
la laboro.

.....por ke vi plej bone komprenu viajn era-  
rojn kaj tiun malprogreson de la socio el kiu  
vi devenas, jen du kutimoj de la homo en la ja-  
ro 1975. Unu el ili estas, kiom stulte vi rekla-  
madis lavmaŝinojn aŭ lavis la vestaĵojn en la  
rivero, kion vi faras nuntempe, malgraŭ la no-  
civaj akvoj, ĉar vi bone scias ke aplikante al  
la surmetitaj vestaĵoj nian purigan polvon vi  
eĉ ne bezonas demeti ilin.

La alia estas tio, kio nomiĝis kisado. Mal-  
higiene oni kunpremris lipojn kontraŭ lipojn tra-  
nspasigante de unu buŝo al la alia la salivon,  
salivo, kiu ofte enhavis malsanajn bakteriojn.  
Vi ja scias, ke tion ni solvis,, ĉar la gasmas-  
koj ne permesas al ni la buŝan kisadon, per fro-  
tado de nuko kontraŭ nuko, kio donas grandan ple-  
zuron, kiam oni fariĝas sperta pri tio.

Nu, tio estas ekstrakto de la letero. Publi-  
kigo de la tuta letero estus tro longa. Mi, per  
sone, pensas ke la urba konsilantaro estis iom  
severa, ĉar la menciita S-ro. Pérez estis kon-  
damnita al la morto pro sia stulteco ne uzi gas-  
maskon. Kun li malaperos raso, kiun mi neniam  
kapablis kompreni.

Noto: Bela fraŭlino, vi ne cerbumu pri tio de la  
kisado, ĉar en la jaro 2313 ni ĉiuj estos senha-  
ruloj.

Luis Serrano Pérez (Sabadell)

## ĈU VI VIZITIS LA HISPANAN ESPERANTAN MUZEON ?.....

Plaĉas al mi viziti lokojn kie oni montras postrestaĵojn de antaŭaj tempoj. Mi vidas ke la homoj estas tiuj kiuj evoluigas la socian historion, kaj oni diras ke la ejoj kie ni povas koni la evoluon estas la muzeoj, institutoj, bibliotekoj, k. t. p.

Ekzistas multaj institutoj, aŭ muzeoj, ekzemple, la Paleontologia, Zoologia, aŭ Historia de kelkaj urboj.

Ankaŭ la hispanaj esperantistoj havas sian Muzeon en Sant Pau de Ordal (Tarragona). Vi nepre vizitu ĝin kiam vi vojaĝos al la mediteranea marbordo.

Vi povos en ĝi trovi multajn esperantaĵojn kaj aferojn rilatajn al la esperanta movado. La esperanta grupo de Sant Pau de Ordal, kun sia fondinto S-ro. Hernández, estas kiu vivigas kaj ordigas la Muzeon.

Vi trovos antaŭ la pordo la buston el marmoro, kiu reprezentas nian majstron Zamenhof. Sur la muroj troviĝas multaj esperantaj afiŝoj pri la Hispanaj Kongresoj; apud ili, observu du grandajn flagojn apartenintajn al malaperintaj esperantaj grupoj de la provinco. Dekstre, sur tablo, estas multaj leteroj, poŝtmarkoj kaj bildkartoj senditaj de samideanoj el la tuta mondo. Oni povas pensi ke la Muzeo posedas pli da esperantaj revuoj ol ĉiuj hispanaj grupoj. Libroj kaj libroj senfine viciĝas ĉe la bretaroj. Ili traktas pri ĉiuj temoj; geologio, astronomio, matematiko, kemio, religio, ekonomio, literaturo, k. t. p.

Petu ion al S-ro Hernández kaj tuj li trovos libron aŭ skribaĵon pri la temo kiu vin interesus, kaj kiam vi jam ne plu scios kion peti, tiam li montros al vi la bildkartan kolekton. Li bedaŭras ke ĝi konsistas el nur 120.000 da ili.

Finigos la vizito per longa aŭskultado de diskoj por kursoj, kie oni povas observi la pronon-



con. Aliaj aŭdigas kanzonojn, konatajn verkojn kaj fabelojn.

Tuj antaŭ via foriro, la prizorganto montros al vi la trezoron de la Muzeo: du aŭtentikajn manuskriptojn de Doktoro Zamenhof.

Vizitu la Muzeon kaj kunlaboru en ĝia kreskado. Petu al viaj korespondantoj revuojn, librojn, insignojn, k.t.p., kaj sendu al "S-ro Hernández, Sant Pau de Ordal, Tarragona". Per tio la Muzeo povos pli grandigi sian kolekton.

Carles Pau Turmo

J.E.S.S.

## \* INFORMOJ \*

-Ni starigis ian HEJS-libroservon. La ekzempleroj kaj koncernaj prezoj estas la jenaj!

Sango kaj sablo.....	90	optoj
Cigana romancaro.....	140	"
Eterneco.....	10	"
Filozofio de fantomo.....	30	"
La lando de Alvar González...	50	"

Vi povas mendi ilin ĉe ni.

-En nia 1<sup>a</sup> paĝo vi jam legas pri antaŭvido de eksterordinara 100<sup>a</sup> numero. S-ro Salvador Aragay, iama HEJS-prezidanto, pretas pagi la presigon de tiu numero. En presita formo, la materialo publikigota devas esti konsiderinde pli granda. Ni kore dankas S-ron Aragay, kaj jam de nun petas al vi kunlaboron por nia 100<sup>a</sup> numero.

-Niaj aktivuloj organizis la 1<sup>an</sup> Artan Junularan Festivalon la 22<sup>an</sup> de junio en Sabadell. Ĉu sukceso?

-En Oporto, niaj portugalaj gesamideanoj organizis renkontigon la 7-8an de junio. Ĝi estis tre sukcesa, kun akcepto de la Guberniestro. Niaj samideanoj el Vigo konsistigis la hispanan reprezentaron. Gratulon!

## DEZIRAS KORESPONDI...

Rusa 23-jara studento de Pedagogia Instituto, Fakultato de Arto. Lin interesas muziko, kaj hispanaj arto kaj muzeoj. Nomo kaj adreso:

Vitaliy Chizhov. ul Sestroreskaja 8-9  
197183 LENINGRAD (Sovetunio)

## Pri nia regularo

Tiuj kiuj iam aktive partoprenis la laborojn de nia Sekcio eble konstatis mankon kaj bezonon de interna regularo por plej glata funkciado, por klarigi taskojn kaj respondecojn, rajtojn kaj devojn. Tial, kiam en Münster Juan Ramón Guifón prezentis proponon pri tio, ni -la tiama estraro-komisiis lin por tiu tasko.

Kiel pretiginto de la projekto kiu estis bazo por la laste akceptita Regularo, mi klopodos klarigi ĝin. Unue, Guifón prezentis sian proponon kaj, ĉar laŭ ĝajne ĝi ne estis akceptebla malgraŭ sia demokratio, kelkaj estraranoj parolis kaj sugestis al mi la neprajn modifojn. Tamen, oni povas diri ke mi prezentis alian tute novan projekton.

El vidpunkto de politika kompara juro (politiko devenas de la greka vorto polis = urbo; do, ĝia origino traktis interhomajn rilatojn enkadre de organizita socio) ni devas distingi statutojn kaj regularojn. Statuto estas normoj de ĝenerala karaktero leĝe rekonitaj kaj aprobitaj; dume, regularo estas privataj normoj kiuj ne ĉiam bezonas leĝan rekonon.

Ĉar HEJS ne havas juran personecon kaj ĝi estas Junulara Sekcio (leĝe ne rekte rekonita, laŭ akceptita HEF-Statuto) de Hispana Esperanto-Federacio (HEF), tial ĝi bezonis internan regularon. Nia Regularo estas "interkonsentita", "mallonga", "ideologie neŭtrala", "rigida"; kaj ni utiligis konceptilojn konscie ke ili estis nesufiĉaj, ĉar ni funkciigis valorkriteriojn kiujne baziĝas sur normoj estendaj, sed sur tio nuntempe konvena.

Ĝi estas "interkonsentita" de la estraroj de HEF kaj HEJS laŭ propono de la estraro de nia Sekcio (kiu praktike reprezentas nian membraron); ĝi

estas "mallonga", ĉar nur enhavas fundamentajn principojn pri idearo, organizo kaj funkciado de HEJS; ĝi estas "ideologie neŭtrala", ĉar nur servas por koni la pozicion de la diversaj konsistaj partoj en nia organizo kaj ankaŭ ĉar ĝi favoras nenian ideologion; ĝi estas "rigida", ĉar modifoj ne estas facile atingeblaj.

La divido estas laŭ jenaj Titoloj: Ĝeneralaj principoj, membreco, organoj, estraro, labormaniero, ĝenerala voĉdonado kaj dissolvo. La Ĝeneralaj principoj difinas nomon, apartenon al alia organizaĵo, aliĝon al organizaĵo, agad-teritorion, celojn, neŭtralecon, lingvon, sidejon kaj administran jaron, el kiuj kvankam plejparte jam sufiĉe konataj menciindas ankoraŭ difinoj pri la celoj kaj pri neŭtraleco. Komprenoble, celoj estas disvastigo kaj praktika utiligo de Esperanto. "HEJS estas strikte senpartia" signifendas ke HEJS kiel tia nek povas nek devas preni partion por aŭ kontraŭ difinita ideologio, tiel en la hodiaŭa mondo kiel en nia movado mem; kaj "la respekto de la homaj rajtoj", tiel kiel ili estas fiksitaj en la Universala Deklaracio, "difinas ĝian neŭtralecon".

Membreco estas dividita laŭ jenaj artikoloj: konsisto, akcepto de membroj, apogantoj, eksigo kaj eksigo. Kaj tiu lasta -eksigo- estas plej interesa; nur per ĝenerala voĉdono povos okazi ke iu membro estu eksigata (vd. ankaŭ art. 26.l.c.).

Du organojn havas HEJS: la Estraro kaj la Junularaj Delegitoj. La nuna stato de la Sekcio ne konsilis enkonduki demokratian sistemon, kaj ĝenerale ĉiu kiu aktive agas en kaj por HEJS estas fingre elektita estrarano (fingre, ĉar la prezidanto diras, montrante iun per sia montra fingro: de nun vi estas estrarano). Tamen, la akceptita Regularo ne akceptas eksigon de estrarano dum la kalendara jaro, kvankam la prezidanto ja rajtas ne proponi lin/sin por la sekvonta jarperiodo.

Alia titolo temas pri la Estraro kaj difinas ĝian konsiston, rolon kaj funkciojn. Kaj kvankam sub aparta titolo -labormaniero- aliaj eroj klarig-

as la funkciadon de HEJS: kunsidoj, voĉdonadoj -okaze de tiuj kunsidoj-, komisionoj, revuo kaj administrado. La revuo estas "oficiala organo" nomata "HEJS", "bulteno kiu estas redaktata en la spirito de la fundamenta principo de art. 6" (tiu pri la neŭtraleco).

Tio signifas ke "HEJS" devas esti nia organo kaj nia revuo. Ĝi devas esti en Esperanto, ĝia oficiala lingvo (vd. art. 7). Ĝia organo, por informi al la membraro pri ĝiaj organizaĵaj problemoj, pri ĝiaj estraraj decidoj, pri ĝiaj klopodoj kaj pri ĝiaj atingoj. Ĝia bulteno, por informi ankaŭ pri HEF kaj pri Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), kaj ĝiaj respektivaj agadoj kaj trajtoj. Ĝia revuo, per ke ni legu esperantlingve pri aktualaj problemoj, tiel ĝeneralaj kiel aparte junularaj. Sed oni devas ankoraŭ emfazi ke ĝi devos respekti la neŭtralecon tiel kiel ĝi estas difinita en art. 6.

Okazigo kaj kontrolo estas artikoloj de la titolo pri Ĝenerala Voĉdonado. Ĝi povos okazi laŭ decido de la Estraro, laŭ peto de kvarono de membroj reprezentantaj la membraron kaj por eksigo de kiu ajn membro.

La restanta havaĵo de la Sekcio restos, okaze de dissolvo, havaĵo de HEF.

Kvankam mi jam pritraktis la tutan tekston de nia Regularo, iom supraĵe kompreneble, restas ankoraŭ punktoj klarigendaj. Tamen, mi nur aldonos ion pri la rajtoj de la individuaj membroj, do tiuj havantaj malpli ol 30 jarojn. Bedaŭrinde, mi ne trovis vojon, ĉu taŭga ĉu simple kontentiga, por plene enkonduki demokratian sistemon. Reprezenta sistemo ne estas facile plenumbla -eĉ mi dirus ke tio estas tute ne ebla, laŭ disponeblaj homoj kaj laŭ maniero funkciigi taŭgan kaj kompetentan instancon, kiu kunordigu la agantojn kaj la agadojn. Mi neniel volis esti utopia kaj tial mi proponis la akceptitan elektosistemon, kiun mi ne povas akcepti kiel demokratia, sed kiu tamen estas -laŭ mia opinio- la nura akceptebla formulo. Tiel ĝia fakta partopreno povos okazi: i) kontraŭante la proponon de la prezidanto

pri la konsisto de la Estraro per subskriboj reprezentantaj almenaŭ kvaronon de la membraro (kio devigus la Estraron okazigi generalan voĉdonadon); ii) aktive partopreni la diskutojn kaj voĉdonadojn okaze de kunsidoj; kaj iii) postulante generalan voĉdonon pri difinita demando. Nu, aktivuloj certe trovos kampon por agi favore al nia Sekcio, malgraŭ tiu manko de plene rekonita demokratio, kiun ĝuste ne enhavas nia Regularo pro tiu adaptiĝo al la cirkonstancoj kaj eblecoj de nia HEJS.

JUAN AZCUENAGA

## "DOKTOR ESPERANTO"

### nun kastililingve

MARIA ZIOLKOWSKA: Doktor Esperanto. Dulingva eldono en Esperanto kaj en la pola lingvoj. 336 paĝoj krom portreto de Zamenhof kaj 16 paĝoj da ilustraĵoj. Tole bindita. Eldonis Wiedza Powszechna, Varsovio, 1959. La esperanta traduko estas de ISAJ DRATWER.

El Esperanto tradukis en la hispanan J. NÁJERA CASTANEIRA. 224 paĝoj. Eldonis ESPERANTA MEKSIKA JUNULARO. Presis Editorial Tlacuilo, Tonantzin 13. México, D. F., la 15-an de februaro 1975. 1.000 + 100 ekzempleroj. Prezo anoncota.

Antaŭ jaroj, precize okaze de la centa datreveno de la naskiĝo de D-ro ZAMENHOF, aperis tiu romana biografio kiu ĵus aperis hispanlingve danke al la agemo de meksikaj gejunuloj. Tiu verko ankaŭ aperis en franclingva versio.

Tiu hispanlingva eldono ne respiegulas la originalan interpunkcion kaj cetere estas iom libera traduko laŭ meksika esprimmaniero. Jen kaŭzoj por ke tiu ĉi versio estu preskaŭ 50% pli ampleksa ol la originalo. Ankaŭ la esperantaj supersignitaj li-

teroj ne aperas laŭ korekta formo, ĉar mankas ĝuste tiuj supersignoj.

Modesta, sed tamen laŭdinda ekzemplo por oldaj generacioj en hispanparolantaj landoj, ĉar ne ekzistas taŭgaj informaj libroj pri nia Esperanto. Kvanke ne estus pli taŭge titoli ĝin Doctor Esperanto, laŭ la hispana, anstataŭ konservi la titolon de la pola originalo? Ĝi ja estas biografio de nia iniciatinto, sed ĝi estas ankaŭ utila por koni la komencon de la Esperanto-movado, ĝiajn klopodojn kaj pensojn, kiuj dekomence estis ligitaj al la figuro de D-ro ZAMENHOF.

La iem konciza esperanta versio estas tradukita en la hispanan pere de plilongigo de frazoj, kiuj estas pli facile kompreneblaj ne nur de meksikanoj sed ankaŭ de hispanoj. Tiu ĉi eldono enhavas nur unu gravuraĵon, kiu krome ne estas en la originalo. Kelkaj ne gravaj eraroj devos malaperi en eventuala dua eldono: polonés, litoviano, egresado -sendube estas vorto sufiĉe konata en Ameriko, sed ĉu ankaŭ en Hispanio?-, sorpresivamente, Lituania (anstataŭ Letonia), membresía, Algeria, ...

Feliĉe ni havas inter ni tiun verkon, kolosa laboro de EMJ. Ĝiaj klopodoj certe meritas subtenon de la esperantistaro, ĉar ankaŭ ĝiaj estraranoj eldonis Doktor Esperanto ne kun profita celo, sed por pli efike informi la publikon pri Esperanto. Cetere, EMJ disponigis al Regiona Agado de TEJO plurajn ekzemplerojn por informado ĉe ambasadejoj kaj kulturaj asocioj en Centra Ameriko. Kaj tio estas nur parto de la laste starigita kampanjo por disvastigo de Esperanto tiel enlande kiel eksterlande. Ĝiaj estraranoj nun klopodas krei esperantajn kernojn en diversaj meksikaj provincoj, precipe ĉe kulturaj societoj. EMJ estas verŝajne la plej aktiva kaj agema junulara sekcio en Ameriko, sed ĝi ankaŭ meritas nian helpon. Aĉetu, do, Doktor Esperanto!

JUAN AZCUÉNAGA



## la urba rabisto

Dum multaj monatoj, en granda urbo, regis paniko, ĉar ganstera bando rabis konstante kaj bankojn kaj entreprenajn kontorojn kaj juvelejojn. Ĉiutage oni aŭdis pri novaj ŝteladoj fare de tiuj banditoj. La ĉefo estis terura homo, tre inteligenta, kiu posedis -ni diru- la "arton" de la rabado, ĉar kvankam ĉiuj bankoj de la urbo estis garditaj de policistoj, kaj ke ĉie estis taĉmentoj de policianoj, neniam ili sukcesis aresti lin.

La gansterestro, en la ŝtelista medio, estis konata laŭ la kaŝnomo "la lamulo", ĉar li lamis iomete ĉe la dekstra kruro. Li ĉiam rabis kun surmetita ruĝa masko.

Post longa ĉiutaga raba agado, dum ses sekvaj tagoj neniu nek io estis ŝtelita. Tiam, la polices-tro konsideris oportuna fiksi sur la murojn de la urbo grandan afiŝon, kio anoncis, ke la civitano kiu denuncos al la polico la lokon kie sin kaŝas la fama danĝera bandito, ricevos, kiel rekompencan, grandan sumon da mono.

Ankaŭ en la urba malliberejo oni konis la novaĵon pri la mona rekompenco. Unu el la malliberuloj, kiun oni enkarcerigis pro bagatela ŝteladeto, vokis la gardiston kaj petis al li bonvolu akompani lin je la ĉeesto de la direktoro, ĉar deziras rakonti al li la kaŝlokon de la danĝera bandito.

En la mallibereja oficejo, la arestito demandis la direktoron, ĉu vere la ŝtato donos al li la anoncitan rekompencan se li diras kie troviĝas la bandito. La direktoro de la malliberejo jesis, kaj aldonis -ĉu vi ne timas, ke iu membro de la bando faru venĝon kontraŭ vi? La arestito respondis energie, ke dum sia vivo timis neniun, tamen, la unua kondiĉo por la denunco estas, ke oni devas doni la monon antaŭ ol malkaŝi la lokon, kaj la dua, ke li

deziras ricevi skribitan garantiaĵon, ke tuj dirinte la kafejon estos tute liberigita.

Du tagojn poste, konsentite kun la urbestro kaj leĝa juĝisto, kiuj partoprenis la eventon, tuj ricevita la mono, kiun la arestito jam enposigis, kaj kun la liberiga atestilo ĉe la mano, s-ro Rikardo Lupmalo (la arestito), diris aplombe, ke la bandito estas tre proksime, ke li staras nune en ĉi-oficejo. Ĉiuj miris kaj rigardis unuj la aliajn. Ridetante, la arestito diris: -la bandito "la lamulo" estas mi! Kaj vere, kiam li marŝis iom lamis...

PETRO NUEZ

**KEĈUA ,**  
**oficiala lingvo**  
**en peruo**



La novaĵo estas vere freŝa kaj interesa: Peruo ĵus fariĝis dulingva lando. Do, la lingvoj keĉua kaj kastilia estas jam oficiale samrajtaj.

Altiras la atenton la fakto ke du trionoj de la loĝantaro el la perua lando parolas keĉue kaj tute ne komprenas la kastilian lingvon, kiu ĝis nun, kvankam minoritata, estis la nura lingvo oficiale rekonita. Pro tio la ĵusa oficialigo, fare de la militista registaro kiu hodiaŭ estras Peruo-n, estas nur rekono kaj akcepto de maljusta socia situacio, kiu ekzistis en la lando ekde la unua tago de ĝia sendependiĝo, kiam oni devis rekoni kaj solvi la veran lingvan staton.

La keĉua lingvo, nomata de la indigenoj "runa



simi" (lingvo de la homoj), estas dolĉa, eleganta kaj kapabla esprimi kian ajn modernan koncepton malgraŭ sia ebla kompleksa malsimpleco aŭ abstrakteco. Ĝi enhavas polineziajn influojn kaj multajn komunajn radikojn kun la MAORIA lingvo (Nov-Zelando).

Je la alveno de la hispanaj konkerantoj (XVI-a jarcento), la misiistoj kiuj akompanis ilin, krom instrui la kastilian, helpis disvastigi ankoraŭ pli la keĉuan lingvon, tiam oficiale uzata de la Inkaoj; kaj tio ĉi okazis, ĉar tiu ĉi lingvo estis asimilita de la najbaraj popoloj pli bone ol la kastilia; kaj fakte estis pli facile por la hispanoj lerni keĉuan ol por la indianoj lerni la hispandevenan lingvon; ĝuste pro ĉio ĉi oni elektis la keĉuan lingvon kiel perilsnpor la evangelizado en tiu parto de Sudameriko.

Felipe la dua fariĝis protektanto de la inkaa lingvo, fondante katedron pri keĉua en la universitato de San Marcos en Limo, kaj poste alian en Kito, Charcas (Ĉarkas), ktp.

La unua skizo de gramatiko estis farita de la pastro Martin de Vitoria, sed inter la verkoj kiuj plej elstaras ene de tiu ĉi temo, oni trovas "La gramatica o arte de la lengua general de todos los reynos del Perú" (Valladolid, 1560), verkita de Domingo de Santo Tomás, kaj "Vocabulario de la lengua general del Perú" (Limo, 1586), verkita de la pastro Holquin, S. J.

La ŝajna bloko de kastililingvaj landoj el sudameriko fendetiĝas iom post iom; unue Paragvajo, kaj poste Peruo, montris la blokon kiel fikcian.

MIGUEL GUTIÉRREZ ADÚRIZ

#### LEOPARDO

Lernanto: Sinjoro profesoro, ĉu estas vere ke la leopardo ne atakas la homojn, se ili portas branĉon de palmo en la mano?

Profesoro: Dependas de tio, kiom rapide oni ĝin portas.

(EL ISTVAN SZERDAHELYI: "Esperanto 2")

# MUZIKA PAĜO


MIGRA KANTO.

Mezforte.


J. Gersbach.



Pro-me-nan-te sur la bor-do, De la blu-a, vas-ta



mar', Ni aŭs-kul-tas la plaŭ-da-don Kaj bru-ad-on de l'on-



dar', Mi-gri, mi-gri en so-mer', Es-tas ve-ra ĝoj' sur ter'.

Se ni vagas en la montoj,  
Birdkantado ravas nin.  
La ŝaŭmantajn akvofalojn  
Admiradas ni sen fin'.  
Migri, migri en somer'  
Estas vera ĝoj' sur ter'.

Sur la vasta erikejo  
Refortigas nin la sun'.  
Idealojn ni pripensas  
Ĉe la lumo de la lun'.  
Migri, migri en somer'.  
Estas vera ĝoj' sur ter'.

Belaj tagoj en naturo,  
Ni vin ŝlosas en la kor',  
Vi, vi restos en la vivo,  
Hela, ora rememor'.  
Kara tero, ĉe la fin',  
Ni elkore dankos vin.

Teksto de C. J. Roskes-Dirksen.

